# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 48 Aŭgusto 19, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj (lingva kontrolo): Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alk: 382, Sume: 812 KB**

**temas nur pri PDF, kiun SMG mem alkroĉis. La pezo de aŭtomate kreitaj PDF ne estas anticipe koneblaj.**


## ILEI eldonis siajn simpoziajn rezultojn




Estas por mi plezuro anonci al vi, nome de ILEI, ke dum la ĉi-jara ILEI-Simpozio, estis oficiale publikigita la 298-paĝa verko 'Simpoziaj Aktoj de ILEI 2020-2021'.

La ampleksa eldonaĵo estas akirebla ĉe

https://www.ilei.info/agado/Simpoziaj_Aktoj_ILEI_2020-2022_e-libro.pdf

Refoje mi, nome de ILEI, dankas al vi ĉiuj pro via persona sindonemo partopreni en nia simpozio dum la pandemiaj jaroj.

Fernando Pita, estrarano de ILEI

## Raportoj ankaŭ el la UK

La lastaj sep Eo-elsendoj de la Pola RetRadio (6 elsenditaj rekte el Torino) – www.pola-retradio.org plenplenas je la sondokumentaj raportaj scenoj pri la 108-a Universala Kongreso de Esperanto. Ankaŭ en la postkongresa periodo en ĝia programo aŭdiĝos pliaj sonscenoj kaj intervjuoj faritaj dum la kongresaj tagoj.

La Redakcio kore dankas al la Kongresa Fako de UEA, membroj de LKK kaj volontuloj pro la donita helpo kaj subteno! Aŭskultu, reĝuu, reagu per komentoj kaj opinioj! Anticipan dankon pro la subteno de nia laboro!

Red. Barbara Pietrzak

## Ĉio estas AMO de Armel Amiot

Jen la definitiva versio de "Ĉio estas amo" de Armel Amiot: https://youtu.be/TtMWEGLE1n4

mga

## Konferenca rekomendo

Jen konferenco pri (mal)egaleco, kiu eble interesos vin. "Lingvo" estas inter la substrekitaj temoj. La organizantoj havas iom da mono por pagi vojaĝkostojn.

Pliaj informoj: https://linguistlist.org/issues/34/2459/

**Xavi Alcalde** <alcalde.javier@gmail.com>

## Brazila Muziko

Se vi volas fariĝi ano de **BrazilMuzika Klubo** mi bonvenigas vin! Ekabonu ĝin ĉi tie: www.brazilakolekto.com/brazilmuzikaklubo

## Turismaj triumfoj

Jen alkroĉita nia dua propono konigi instrumaterialojn el la abunda arĥivo de SMG.

## MONA-kunsido en UK pli detale

Jen la ĉefaj agadoj lastjare:

**Irano:** Okazis regula publikigado de la organo de IrEA kaj retaj seminarioj - IrEA kunlabore kun universitatoj en diversaj urboj de Irano aranĝis ret(sem)inariojn kiuj prezentis Esperanton, kaj Eo-kursojn por komencantoj.

La 10-a Irana Esperanto-Kongreso (IrEK-10) okazis dum kvar tagoj fine de aprilo.

Temo: Post-Esperanta Mondo en du apartaj partoj ĉeeste kaj rete kun samtempa elsendado de la reta parto ankaŭ en la jutuba kanalo de UEA

**Israelo:** Ĉiusemajnaj renkontiĝoj, unufoje monate hibridaj, trifoje virtualaj, kun partopreno internacia. La 23-a Israela Kongreso okazis en Tiberiado tra tri tagoj kaj kun pli ol 30 partoprenantoj, ĉ. duono el eksterlando. Sekvis 6-taga postkongresa ekskurso tra Israelo kaj Jordanio, kun 11 partoprenantoj el eksterlando

**Egiptio:** Okazis retaj renkontiĝoj.

Gila Wandel, Israelo

## Amerika Komisiono en UK pli detale

- Dudeko da partoprenantoj konsideris la laborplanon 2023 de la Komisiono:
- Organizado de TutAmerika Kongreso de Esperanto (TAKE) okazonta en Fortaleza, Brazilo, 2-5 novembro 2023.
- Restarigo de la interreta paĝaro <Ameriko.org>.
- Instruado de Esperanto per kursoj por hispanlingvanoj kaj portugallingvanoj.
- Libro-bienalo en Brazilo.
- Identigo de konsilistoj en ĉiu suda kaj centra amerika lando.
- Poste, la partoprenantoj menciis kelkajn iniciatojn: Kiel komuna Ĉilia-Argentina Esperanto-kongreso en 2024 aŭ 2025.
- Organizado de AMO-seminario dum TAKE.
- Uzado de datumbazo por kunligi la Esperantistojn en la Amerikoj.
- Uzado de Telegram-retoj kiel 'Esperanto en Ameriko'.

## Universitata kurso en Kaŭnas ekos septembre

Litova Esperanto-Asocio serioze ekokupiĝis pri instruado de Esperanto por novuloj. Unue ni celas al Kaŭna universitato Vytautas La Granda. En julio, la prezidanto de

Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas renkontiĝis kun direktorino de la Instituto pri fremdaj lingvoj de tiu universitato d-rino Teresė Ringailiene kun kiu li traktis multajn aferojn. Estis interkonsentite, ke tiu Instituto ekde la nova studjaro enkondukos Esperanton kiel elekteblan studobjekton  en oficialan studprogramon de la universitato. Por tiu instruado universitato dungos Aida  ČIŽIKAITĖ, kiu faros tiun kurson de Esperanto. La interkonsento jam komencis realiĝi. La Instituto en aŭgusto  jam anoncis komencon de registriĝo por tiu kurso de Esperanto, kiu ekos la 4-an de septembro. La kurso okazos kvarfoje semajne. Aliĝi al la kurso rajtas studentoj de ajna fakultato de tiu universitato, studentoj de aliaj Kaŭnaj universitatoj, oficistoj de la universitato kaj loĝantoj de Kaŭnas. Por anonco pri kurso de Esperanto en la universitato, vidu: http://uki.vdu.lt/kvieciame-mokytis-esperanto-kalbos/

Povilas JEGOROVAS

## Mallongaj vidbendoj pri la kongreso de ILEI

Ilin faris Patrizia Rivaldi el Italio:

thttps://www.youtube.com/shorts/douatXoc600
https://www.youtube.com/shorts/RxWe8Go8M1c

## Novaj planoj por la ĉina universitato

La instruisto Semio parolas pri la Zaozhuang-Universitato en Ĉinio (kie estas Esperanto-Muzeo kaj Eo-fako) kaj siaj planoj por la estonto.

https://esperanto.cri.cn/2023/07/12/ARTIVueEGYDFqq7aMqnSZsTk230711.shtml

Sendis Alessandra Madella

## Jam la kurso-komenca sezono baldaŭ ekos

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis ero ĉe la Kursejo.

Nomo:  Online-Esperanto-Kurs für Anfänger ab 18.09.2023
Gvidantonomo:   Heinz-Wilhelm Sprick
Tipo:   Nova movada kurso
Loko:  Hameln, Germanio
Aldoninto:  hipopotamo

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27545

## Aliĝado al Aruŝa: Tanazio atendas vin!

Bonvolu aliĝi nun al la 109-a Universala Kongreso ĉe por ĝui la plej favorprezan aliĝperiodon! Plua diskonigo de tio ĉi estas tre bonvena kaj dankata.
https://uk.esperanto.net/2024/ –

Adje Adjévi

============== vortoj: 715 =============

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.